

STARTO



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1977 No2(60)



Aleksandrs Čaks

AL STRATOJ

Ne pro tio kantas mi la kantojn,
Ke mi eble fama iĝu iam,
Dum mi korek portas kvazaŭ planton,
Por kun vi mi restu kune ĉiam

Stratoj, stratoj, nudpieda kie
Tiom multajn flakojn mi travadis,
Panjo plu neniam venos tien,
Per ĉareto min reveturadi.

Tie mi kalkulis najlojn aŭteradajn,
En la fluoj flosis cigaredo-erojn,
Kiam mi ekvidis la tilifloradon,
Mi ebria estis kiel de biero.

Kiam devas mi de vi foriri,
Min konsenti ja neniu povas,
La piedoj ne obeas iri,
Vin valize mi kunpreni volas.

El latva lingvo esperantigis

Milda Jakubov

1945
MAJO
1977

Grava solenaĵo



1902 1977



Sabate la 5an de marto 1977 festis la ĉeĥoslovaka esperantistaro tri gravajn datrevenojn, nome 90-jaran jubileon de ekesto de Esperanto, 75 -an datrevenon de fondiĝo de la Praga Esperanto-klubo kaj 60-an datrevenon de la morto de Dro L.L. Zamenhof. En la salonego de la Urba Biblioteko de Prago je la 13.30 horo komenciĝis la edifa solenaĵo per enkondukaj vortoj de la Praga klubo, Ladislav Kynčl. Poste dro Nývlt vaste priskribis la 75 jarojn de agado de la Praga Esperanto-Klubo. En sekvanta parolado prezidanto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Josef Vitek donis ĝeneralan supervidon de atingitaj sukcesoj kaj perspektivon de nia plua agado. Post la kompleta parolado de Drahomír Kočvara sekvis artisma kultura programo.

Dramatika artistino, aktorino Eva Seemannová prezentis trasantite monologon de Tatjana el Eugeno Onjegin de A.S.Puŝkin en traduko de Jiří Kořínek, fragmenton el Ifigenio en Taurido de J.W.Goethe en la traduko de L. L. Zamenhof kaj inter pliaj la poemon de B.Urbanová kaj ankaŭ siajn versojn al la Patrino. Dro Pravoslav Sádlo-Páv, direktoro de muziklernejo kaj virtuoza sur violonĉelo prezentis aplaudeginde suiton por violonĉelo-solo de J.S.Bach. Solisto de la Ŝtata Opero en Ustí nad Labem, Miroslav Smyčka, kies belegan baritonvoĉon oni admiris jam ĉe multaj okazoj, interalie ĉe la Universalaj Kongresoj en Londono kaj Beogrado, prezentis en alte artisma dono kaj belega Esperanto pluraĵn perlojn de la opera kaj kanta trezorejo. Ni citu nur "En tiu tomo obskura" de L.v. Beethoven, "Kanton pri la pulo" de M.P.Musorgskij, la brilan kavatinon de Figaro el la Barbiro de Sevilla de G.A. Rossini, bolero de Escamillo "Toreador" el Carmen de G. Bizet, ĉiujn en perfekta traduko de Jiří Kořínek. Plue kanton de karmemora Ŝtefo Urban "Ni ĝoju" k.a. Pianakomponojn havis dirigento de la Ŝtata Operejo en Ustí n.L. J.Kubica, kiu ankaŭ akompanis la admininde bri-lajn programerojn de virtuozaĵo je ksilofono, s-ino Bena Havlů, kiu por siaj prezentoj de fragmentoj el verkoj de Liszt, Bizet k.a., samkiel por unika prezento de ĉeĥa popolkanto, aplaudegita dum ŝia Sudamerika turneo, rikoltis necesantan aplaudon.

La posttagmeza solenaĵo havis altan artisman nivelon kaj plene adekvatis al la tri gravaj jubileoj kaj restos longe en la memoro de la ĉeĥistoj.

Jiří Kořínek

OBNOVÍ SE TRADICE "VERDA STACIO" ?

Francouzský esperantista Henri Masson z Courbevoie napsal zahraničnímu vysílání Čs.rozhlasu, že by uvítal, kdyby nás rozhlas obnovil vysílání v esperantu. Odpověď rozhlasu byla v zásadě příznivá. Bylo by vhodné, kdyby čs.esperantisté upozornili na tuto skutečnost své zahraniční přátele. Bude-li ohlas dostatečný, mohlo by se podařit obnovit někdejší tradici - Verda Stacio. Podrobnější informace o dopisu H.Massona přináší Pilo-Pres č.10 z 8.3.1977.

✱ TUTMONDA FESTIVALO DE JUNULARO KAJ STUDENTOJ 1978 okazos en Havano/Kubo/. Kiel skribas A. Rodríguez, la kubaj esperantistoj bezonas kiel sole plej grandan partoprenon de junaj samideanoj en tiel grava evento. "Se la Festivalon partoprenos kontentiga nombro de esperantistoj, ni povos komenci grandan nacian kampanjon por disvastigi Esperanton en Kubo", skribas la kuba amiko. /zh/

JUS APERIS NOVA PANORAMO KUN ELEKTO DE EMINENTAJ POEMOJ DE J.J.KOŘÍNEK. VI POVĀS ĜIN MENDI ĈE ĈEĀI PREZO 16,- Kčs AU 5 ĤRPK.NE ATENDU.STOKO NE ESTAS TRO GRANDA !!

PANORAMO

Literatura almanako de STARTO



sts
mimoň, n. p.



Opravy traktorů
GO taháčů št 180
Opravy zemědělských strojů
Renovace naváňecí techniky
Montáže a opravy stájové mechanizace
Elektroinstalace a hromosvody
Ochrana rostlin
Polní mechanizační práce

SLUŽBY ZEMĚDĚLSTVÍ

V těchto profesích nabízíme zaměstnání

PŘIJĎTE MEZI NÁS !

Informace podá KPU STS Mimoň, tel. 2351-5

Antaŭ 60 jaroj forpasis la aŭtoro de Esperanto **LA LASTAJ TAGOJ DE L. L. ZAMENHOF**

Estas konate, ke E.Privat, kiu en la fino de 1916 vizitis Varsovion kaj la kreinton de Esperanto, vidante lian malsanan aspekton, baldaŭ forlasis lin kaj al la tutmonda esperantistaro faris la proponon, aranĝi la sekvontan kongreson en la ĉefurbo de Pollando por evitigi al Dro Zamenhof longan vojaĝon.

Jam pli frue la preter vojaĝintoj rakontis pri lia malbona farto. D-ro Leono Zamenhof skribis: "La atakoj de la brusta angino, komence malfortaj, en la monato majo 1916 fariĝis tiel oftaj, ke ili tute malebligis al li ne nur metiajn okupojn, sed ankaŭ lian plej amatan laboron por Esperanto. Tiuj atakoj ofte aperadis, kelkfoje tage kaj nokte forpeladis de li kvietan dormon. La doloriga stato de lia malsano malĝojige influis lian psikon. De oktobro 1916 ĝis februaro 1917 Dro Zamenhof sin sentis relative pli bone, kvankam la atakoj ne forlasis lin tute, aperante nun pli malofte kaj malpli dolorige.

La 1-an de aprilo 1917 la havena komandanto en Varsovio, majoro Neubarth, lastfoje parolis kun Zamenhof, li rakontis, ke Dro Zamenhof estis ĝojige freŝa kaj bonhumora, kaj lia voĉo sonis preskaŭ klare, kontraste kun la obtuzeco de la lastaj jaroj. Antaŭ pasko aro Neubarth renkontis en la tramveturilo A.Grabowski kaj eksciis, ke okazis subita resericio en la farto de l'malsanulo.

"Ŝajne - skribis Leono Zamenhof - la malboniĝon de lia stato kaŭzis la neatendita ekscio pri la morto de nia frato Aleksandro, kiun li tre amis kaj kiu mortis la 27-an de julio 1916 en Drjak, Ruslando, estante milita kuracisto. La sciigo nur post longa prokrasto alvenis tra Kopenhago."

Ĝaudon, la 12-an de aprilo, 9-aŭto Neubarth ne plu estis allasata al la paciento. La stato de malfortigita koro malebligis al tiu testadon en kuŝa pozicio. Sed ankaŭ baldaŭ la sida pozicio fariĝis por li suferiga. En tiuj turmentoj la dormo aŭ ia ajn ripozo estis por li tute neebla. Malgraŭ tiuj grandaj fizikaj kaj psikaj doloroj li neniam plendis.

La 14-an de aprilo 1917 la stato de L.L.Zamenhof rapide pliboniĝis; la koro komencis labori pli forte kaj la kuracistoj ekhavis la esperon, ke venos pliboniĝo. Tiel ankaŭ pensis Dro Ĵudoviko Zamenhof kaj estis en tre bona humoro. Li eĉ rakontis al la ĉirkaŭantaro siajn anekdotajn sonojn kaj faris al si esperon, ke post longa interrompo li povos la alvenantan nokton pasigi oportune en sia lito. Je la 5-a horo vizitis lin lia konstanta kuracisto kaj amiko Dro.K. kaj konstatis de li efektivan pliboniĝon. Post duonhora amika interparolo, sentante sin iom laca, Zamenhof petis la permeson iom ripozi.

Kiam lia edzino alproksimiĝis por prepari al li oportunan kuŝejon, ŝi jam trovis sian edzon morta! La morto alvenis subite kaj kiel deziris la mortinto, sen turmentoj.

Lundon, la 16-an de aprilo 1917, funebra procesio forlasis la domon sur strato Królewska, nro 41. Pri la vivo de l'funebrato detale oratoris en la Varsovia templo Dro.S. Poznanski kaj post li la multjara amiko de Zamenhof - Leo Belmont, kiu per unuhora pollingva parolado elmontris la signifon de la vivoverko de l'forpasinto. Li menciis, ke homo naskita ie en malriĉa juda urbo parto de Białystok sur pola tero, kaŝiganta ie en strato Dziką - el tiu strato sur la ŝtupoj de ĝl'glozo venis en grandajn centrojn de Eŭropo kaj Ameriko kaj spertis monarĥajn respektigaĵojn kaj tiujn de entuziasmigitaĵ amasoj de nau kongresoj.

Ia lingvo -ligilo de popoloj- estas fakto. Genia devis esti homo, kiu plenumis tiun miraklon.

En Esperanto lastfoje adiaŭis sian amikon Antonio Grabowski - kiu iam la unua salutis lin en lia lingvo.

V. Pechoĉ



Jubilejní 25. letní esperantský tábor v Lančově



1. běh 17.7.1977 - 30.7.1977

2. běh 31.7.1977 - 13.8.1977

V rámci tábora proběhnou kursy:

- A- pro začátečníky
- B- pro pokročilé
- C- konverzační
- D- pro budoucí učitele esperanta
- E- překladatelský pro absolventy kursů 0,D

Vyučuje se dopoledne. Odpolední program zahrnuje sport, koupání, vycházky, večerní táboráky a besedy. Strava je 5x denně. V programu každého běhu je celodenní výlet spojený s prohlídkou pamětihodností bližšího i vzdálenějšího okolí.

Táborový poplatek pro dospělé nečleny ČES a ZE SSR je 700 Kčs, pro členy obou svazů je odstupován podle termínu přihlášení od 520 do 700 Kčs, pro mládež do 18 let od 470 do 630 Kčs. Bližší informace a přihlášky zašle:

Klub esperantistů, místní skupina ČES,
poštovní schránka 72, 674 01 Třebíč

Jubilea 25-jara Somera Esperanto-Tendaro /SET/ okazos en du etapoj - /17.7.-30.7.1977 kaj 31.7.-13.8.1977/ en la tradicia loko apud la valba - raba lago Vranov ĉe la vilaĝo Lančov en la distrikto Znojmo. Krom diversgataj kursoj la programo enhavas aperton, banadon ekskursojn, tendarfajrojn ks. Estas invitataj eksterlandaj samideanoj kun bona sciigo de Esperanto, kiuj ŝatas tendaran vivon kaj volas perfektigi en la lingvo. Detalajn informojn kaj kaj aliĝilojn petu de

Esperanto -Klubo, loka grupo de ĈEA,
CS 674 01 T r e b í ĉ , ĈSSR

Jarní zasedání ÚV ČES:

JARNÍ ZASEDÁNÍ ÚV ČES se konalo 30. dubna v hotelu Olympia, Praha - Smíchov. Na programu byly mj.:

- zpráva o činnosti předsednictva od podzimního zasedání, zprávy vedoucích jednotlivých komisí a sekci svazu
- patronát členů ÚV a UKRK nad jednotlivými místními skupinami
- porada s redaktoři Starta a Paca včetně všech separátů s cílem zkvalitnit obsah tiskovin

- informace o průběhu a výsledcích jednání IX. a X. setkání vedoucích představitelů esperantských organizací socialistických zemí
 - hospodaření svazu, schválení zpráv a závěrečného úřtu
 - kooptace dalších členů ÚV a jejich náhradníků.
- Jednodenní jednání bylo plodné a přineslo mnoho užitečných podnětů. Usnesení ukládá další zkvalitnění práce jednotlivých orgánů svazu i místních skupin.

Jiri Korinek: Ĉu reformemo savodona? :

Jam en la unuaj jaroj de Esperanto, kiam montriĝis, ke la Internacia Lingvo neiel rapide aŭ eĉ furore disvastiĝados, kaj ke ĝi puŝas kontraŭ obstinajn antaŭjuĝojn kaj obstaklojn, aperis homoj, kiuj tion atribuis al nekonsvena strukturo de la lingvo, kaj ili emis vidi savon en nepre farenadaj reformoj. Ni scias kiel jam ekde 1894 Zamenhof luktis kum diversaj reformpropoj, ofte reciproke tute kontraŭaj. Ekstis la Ido-krizo, aperis centoj da pluaĵ planlingvaj projektoj, iuj ellaborintaj de elstaraj lingvistoj. Estis inter ili projektoj pli skemecaj, eble pli perfektaj teorie, kaj ankaŭ projektoj pli "naturalismaj", t.e. pli sekvantaj iujn europajn lingvojn, sekve malpli memstaraj kaj firmstrukuraj ol Esperanto. Sed montriĝis, ke tiu Esperanto, kiel ĝiaj kontraŭuloj asertis, duonperfekta kaj amatorea, estas plene vivkapabla kaj evolupova, dum la aliaj projektoj vegetis kaj forvelkis.

Ni iom rigardu nian Esperanton. Ni devas koncedi, ke ĝi ne estas lingvo absolute perfekta - kiel cetero ĉiu homa kreaĵo. Sed ĝi estas relative bone konstruita kaj plene viv-kaj servokapabla. Kaj kompanse ĝi havas grandan pozitivan avantaĝon: ĝi estas vivanta, elprovita kaj uzata en miloj da verkoj diverskampaj, kun respektinda literaturo, vortaroj, kun relative granda lingva komunumo kaj disvastiĝo, kun tradicio kaj stabiliga inercio. Poliumente en la Enciklopedio de Esperanto, en Esperanto en perspektivo, oni mire konstatas, kiom da laboro de eminentaj homoj dum tri generacioj estis al ĝi dediĉita. Tio estas grava pezilo sur flanko de Esperanto.

Esperanto prezentas ian kompromisan, sintezan planlingvan sistemon, tion ni ne darfus forgesi. Eĉ ĝia reguleco ne estas absoluta. Ni vidas, ke ĝia aŭtoro ekz. ie lasis por malaj nocioj apartajn radikojn, kiel ekz. komenci, fini, kvankam ekzistas eble uzi malkomenci, malfini. Ankaŭ ni vidas, ke li kaj la pluaĵ lingvouzantoj preferis formojn pli internaciajn, t.e. komunajn al la plejparto de lingvoj parolataj en Eŭropo, Ameriko, Australio kaj pro la postkolonia heredo ankaŭ parte en Afriko. Tiaj vortoj estas ekpozicio, inkluzive, ekskluzive, kontribui, imputi, amputi, precedenco k.s., ceĝantaj al la naturalisma aspekto de la lingvo, kaj oni ne kreis, eble lau la vastsignifaj latinaj verboformoj por la unua persono "pono, puto, tribuo" verbojn poni, kludi, puti, tribui pluformeblajn pli memstare kaj skemece per la bazaj lingvaj elementoj, t.e. per afiksaro, prekiĝintaj prepozicioj kaj vortkunmetado.

Tiu ĉi maniero devis kompreneble pagi por la certagrada konformiĝo al la internacia/eĉ se limigite internacia/ aspektigo per neceso de pluraj radikvortoj. Sed estas trompa iluzio, ke la internacia planlingvo estos radik-malriĉa, kun laŭeble magra vortaro. La malo estas vera. Kvankam ĝi gtrebos al relativa reguleco ĝi estos lingvo tre riĉa, nuanceprimiva, kun ĉiaj faktarminaroj kaj ankaŭ ekipita por artismaj taskoj. Kompreneble ne ni, ankaŭ en la etnaj lingvoj, scipovos kaj bezonos ĉiujn vortojn de ĉiuj fakoj. La avantaĝo de Esperanto tamen restos, ke per sia aglutina karaktero kaj afiksaro termesos kun kelkcent radikoj iom primitivan esprimadon al tiuj, kiuj ne emas kaj ne devas lerni pli da vortoj, ol kiom ili bezonas por siaj senpretendaj celoj, ekz. poŝtmark-kolektado, simpla amika korespondado k.s. ŝajnas al mi, ke same trompa iluzio estas kredi, ke, se oni reformos regulige, "memstarige" la vortaron de Esperanto, kiel proponas en siaj artikoloj s-ano Karolo Piĉ, Esperanto fariĝos multe pli akceptebla kaj facila por milionoj da neeŭroplingvanoj, ekz. ĉinoj, japanoj, hindoj, indonezianoj k.s. Por tiu iluzio ni devus pagi per reformo de nia vortaro. Se ni estus konsekvencaj, ni devus lau propono de Karolo Piĉ el vortoj origine derivitaj de la sama radikoj "klud" kiel ekskludi, inkludi, konkludi ktp, formi regulajn derivaĵojn de nova verbo "kludi": elkludi, enkludi, kunkludi ktp, el nova verbo "poni" anstataŭ ekponi, ekpozicio, deponi, disponi, komponi, imponi ktp, krei elponi, elponejo, deponi, priponi, kunponi enponi, /komponisto fariĝus kunponisto/, anstataŭ atribui, kontribui, distribui, novan verbon tribui kun derivaĵoj altribui, kuntribui, distribui, ankonduki novan verbon "puti" /kion kun puto/? kaj ansta-

tau deputi, imputi, amputi, komputi ktp, enkonduki derivaĵojn deputi, enputi, forputi /kruron/, kunputi ktp. Jen al niaj komputero, komputoro kaj komputilo naskiĝus plua sinonimo kunputilo ! Kaj tiel ni devus trakombi kaj konsekvence reformi nian tutan vortaron.

Ni ne kredas, ke ion similan aprobus la Akademio, nek ke plejparto de esperantistoj akceptus tian reformon. Plejbonokaze dikiĝus la vortaro per pluaĵ balastaj sinonimoj. Ni scias, ke okazis dum la lastaj 30 jaroj kelkaj reformproponoj, iuj eĉ de akademianoj. Tiel ekz. akademiano Teo Jung, krom ke li lanĉis nefundamentan uzadon de pasivaj participoj, kion post longaj disputoj kaj kvereloj reordigis saĝe kaj Zamenhofe la voĉdono kaj decido de la Akademio de Esperanto, li rekomendis en Heroldo forigon de deviga akuzativo en Esperanto. Pastro Kubacki ekpropagandis novan Esperantan alfabeton sen supersignoj kaj kun enkonduko de novaj literoj kaj eĉ eldonadis periodaĵon en tia lingvo. Kaj aperis aliaj reformemuloj. El inter ili mi volas menci arkitekton Francisko Azorin, en Meksiko, kiu en la kvindekaj jaroj malgraŭ avertoj /interalie ankaŭ miaj/ eĉdonis per konsiderinda kapitalo grandan Esperanto-vortaron, en kiu li ion simile al la propono de Karolo Piĉ reformis kaj "reguligis" la Esperantan radikaron. De radiko "sal" estis ekz. derivaĵo salato - io salita, de radiko "sofi" li derivis sofismo, filozofo, filosofio /anstataŭ filozofo, filozofio/, el radiko "sid" li derivas prezidento /anstataŭ prezidanto/ ktp. Simile li laŭ arkitekta liniilo "reguligis" la tutan vortaron. Kompreneble la Akademio akre kondamnis la fuŝan vortaron kaj en la Esperanto-gazetaro aperis severaj avertoj kontraŭ ĝia uzado. Tiel estis disipita al ni tiom mankanta kapitalo pro kaprice kaj nedisciplinemo de unuopulo.

Plene mi konsentas kun propono de Karolo Piĉ, ke pravigon havas pluraj koncizigitaj vortoj, resp. radikoj, kie la pseudosufiksoj estas ĉiastindaj kaj kiel ni apud "civilizacio" havas "civilizo", apud ekspozicii - ekspoziti, apud erudiĉi - erudi, apud autentika - autentica, oni ekuzu apud diskriminaci samtaŭgan diskrimini ks. Nur kie ĉiu el la du formoj havas apartan nuancsignifon ili estas nerudukteblaj je unu sola formo, kiel en okupi - okupaci /militite, agrese okupi/ ks.

Konklude eblas diri, ke ankaŭ en la PIV, kiu cetere ne estas oficiala verko de la Akademio de Esperanto, estas ankaŭ kritikendaj malkorektaĵoj, superfluaĵoj aŭ mankoj /mi ne trovis en ĝi la jardekojn uzatan kaj en ĉiuj ĝeĥaj kaj slovakaj vortaroj listitan verbon darfi/, sed oni devas juste agnoski, ke ĝi estas ĝis nun la plej grava kaj normiga vortaro de Esperanto. Iuj mankoj estu forigitaj en la pluaĵ reeldonoj.

☞ "ESPERANTO NĀS OPRAVDU CHYTLO", ĉtame v dopise, který napsala svému učitelu v písemném kursu jedna jeho účastnice: "...měli jsme s manželem velkou radost z Vaší pochvaly. Budu se snažit nepolevit, abych si ji opravdu zasloužila. Už se těším na zahraniční korespondenci s někým, i když si myslím, že si nebudu moci hned tak troufnout ... Vždycky se už moc těším na další lekci i na Vámi opravená cvičení. Manžel každý den předčítá pro zopakování slovíčka ze všech lekcí a oba máme radost z našeho malého Miloška /3 roky/, který bez vyzvání překládá esperantská slova do češtiny, sice do té své trochu ještě šišlavě, ale přesto správně. Mile nás překvapil množstvím slov, která si zapamatoval a ke kterým denně přibývají další..." Vidíte, že stojí za to propagovat náš písemný kurs? Uvědomujeme si, jaká je to rezerva pro naše hnutí?

☞ INTERNACIA MEDICINISTA ESPERANTO-KONFERENCO EN KRAKOVO : Universala Medicinista Esperanto-Asocio kaj la Studenta Esperanto-Rondo ĉe la Medicina Akademio de Krakovo organizas Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon en Krakovo /Pollando/ de la 13-a ĝis la 17-a de julio 1977. Laŭ la programo okazos esperantlingvaj prelegoj medicinistoj, vizito de farmacia fabriko, duon- kaj tuttagaj ekskursoj. La partoprenkotizo, kiu inkluzive la tranoktadon, dufojan manĝadon en tago, ekskursojn, koston ĉ. 1.100 zlotojn. La aliĝdato estas ĝis la 15-a de majo 1977. Informojn kaj aliĝilojn oni petu de S-ro Vladimiro OPKA, prezidanto de la Studenta Esperanto-Rondo, Str. Grzegorzeczka 20, PL-31-531 KRAKOVO, Pollando.

Karolo Pit: Pseudoelementoj (Lasta parto)

Aliflanke Esperanto ne povas adopti la naturalisman /kaj jes ja same latinan/ -or', kiu iam prezentigas jen ankaŭ kiel -ator', jen kiel -itor' au -etor', depende de tio, ĉu temas pri verboj, respektive supinoj de la unua, dua, tria au kvara latinaĵa konjugadoj 1/. La kialo estas klara. Esperanto ne posedas ian "regulon de Edgar de Wahl" kaj tial /feliĉe !/ ĝi eĉ ne povas havi sufiksojn, kiuj dependus ne de la esperanta, sed de la latina gramatiko, se ne paroli pri tio, ke -or' / -ator', -itor', -etor' / estas pli malpli necesaj. Ĉar -or' / kaj la aliaj / signifas jen aganton, jen agilon. Sed por aganto Esperanto jam havas -ant' kaj -ist', kaj por agilo la universalan, skemecan sufikson -il'. Laŭ PIV -il' estas ordinare rezervita por simplaj instrumentoj. La ĝenerala uzado tamen ĉiam pli kaj pli inklinas apliki -il' ankaŭ por la plej komplikaj aparatoj kaj maŝinoj tiel ke, ekzemple, komputilo jam ferigis preferata indigena esperanta formo de komputero, kiu tial ne populariĝis, eble pro tio, ke ĝia -er' ne estas la klasika esperanta -er' / parto de io/, sed la angla /kaj ĝenerale germana / variaĵo de la ĵus traktita latindevena -or', fakte -il'. En tia situacio -il' ŝajnas prezenti probable la solan eblan solvon, kapablan konduki nin al la "internacia", naturalisma labirinto, kiu reprezentas -or', -ator' kaj -er', retren al la logika ordo 2/.

Neniakaze Esperanto povus havi kaj -ator' kaj -or'. Tamen se oni al-lasus nur -ator', oni devus aliasi ankaŭ kompresatoro, konvertatoro, kiuj estas evidente neakcepteblaj, sovaĝaj kaj monstraj. Kaj se oni elektus nur -or', oni ne povus eviti diktoro, kondansoro, osciloro, transformoro, kiuj anuavide aspektas iom neordinare. Sed lingvo, ĉu lingvo ĉiujne ja estas nenio alia ol akoro de konvencio, interkonsento kaj akutimigo. Kaj tio nur denove montras, ke ankaŭ la afiksa sistemo esperanta ne toleras naturalismajn solvojn, fremdajn al la autonoma, aglutina kaj skekca spirito de la lingvo.

Ni kludas: Pseudoelementoj estas la proja ĉevalo, renversonta la esperantan vertofaradon el interne. Pseudoelementoj obeas neniajn ajn regulojn kaj principojn. Ili sola celo estas enporti en Esperanton la samajn malordon, konfuzon kaj kaoson, kiuj jam regas en Interlingue, Interlingua kaj en la lingvoj naciaj. Tial ĉiuj pseudoelementoj estas ne nur severe evitendaj, sed senplue kaj senpardone tuj elsarkandaj kaj forigotaj. Ĉar ĉia toleremo, ĉar ĉia hezitado ĉi tie egalus sinmortigon.

Notoj:

- 1/ En la latina regas perfekta simetrio. Kiel reprezentantojn de la unuopaj konjugadoj ni prenu -l/ laudo, laudare, laudavi, laudatum, 2/ deleo, delere, delevi, deletum, 3/ carpo, carpere, carpsi, carptum, kaj 4/ audio, audire, aŭdavi, auditum. La supinoj de la koncernaj verboj estas l/ laudat-um, 2/ delet-um, 3/ carpt-um, 4/ audit-um. Se nun la finajn -um ni anstataŭigos per -or, ni ricevos tute regulajn l/ laudator, 2/ deletor, 3/ carptor, 4/ auditor. En la latina do ne ekzistas -ator, respektive -itor au -etor, sed nur -or, ĉar tiuj -at-, -it-, -et- ne estas parto de la sufikso, sed finaĵo de la supino. La latina sistemo, ja komplika en sia simpleco kaj simpla en sia komplikeco, estas do eleganta, sed tute alitipa ol la skemeca sistemo de Esperanto. Sekve tiuj du sistemoj estas absolute neakordigeblaj kaj neegaligeblaj, se ne paroli pri tio, ke Esperanto, ekzemple, havas ja kredito, tamen debeto kaj debito, tiel ke, eĉ havante -or', ĝi povas derivi kreditoro, sed ne plu debitoro, kio ja estas nur unu plia natura frukto de nia komplete nenatura "naturalismo".
- 2/ La sama -er', fakte signifanta -or', troviĝas cetera eĉ en la konnata cirkularo, kiu laŭvere signifas cirkul-or-o /cirkulanto/, kaj kies aŭtenta, pure esperanta formo verdire devus esti cirkul-al-o, t. e. "cirkulalo", io cirkula, komprenu : letero, tute same kiel katedr-al-o estas io katedra, komprenu: preĝejo!

* * * Revenczoj * * *

KANTO SUPER NULIIO- /ok slovakaj aŭtoroj/ Eldonis Ĉeĥoslovaka sekcio de MEM kiel aldonon al ĉeĥoslovaka numero de Paco 1976. Redaktis O.Kniĉhal. Havebla ĉe ĈEA, Praha 1, Jilská 10 por 4 Kčs /sen poŝtelŝpezoj/ aŭ kontraŭ du respondkoponoj.

La slovakaj literaturoj, kiel ceteraj ĉiuj literaturoj de malgrandaj nacioj, tre malfacile -pro lingvaj barieroj - enpenetras en konscion de la eŭropa kaj monda literaturo. Tial decas aprezii la klopodon de la esperantistoj konatigi speciale tian literaturon al monda legantaro pere de la internacia lingvo.

Ok aŭtoroj de tiu ĉi malgranda antologio de poezio kaj prozo apartenas al la generacio de verkistoj, kiuj /kun escepto de Gregor-Tajovsky/ vidis la venkon de la socialisma revolucio; por ĉiuj estas tipa realisma artmetodo kaj intereso pri socia problemaro.

La traduko fare de konataj slova - kaj-ĉeĥaj esperantistoj estas elstaraj; bedaŭrinde ne same bona estas la kvalito de la tipografia ornamo.

/jĥ/

H. H. TAMSAAPER: LA MASTRO DE KÖRBOJA MANO. Tallin, Nesti Raamat 1976. 155 p.

El Estonio venis denove vera literatur-frandaĵo, la debuta amromano de elstara estona verkisto /1878 - 1940/ el la jaro 1922. La pura ĝamenhof-lingva traduko fare de B. Kart efektivigas la ideon diritan en la postparolo de Heino Puhvel, nome, ke "la kreaĵo de talenta verkisto apartenas ne nur al tiu popolo, el kiu devenas la verkisto, sed ĝi trovas vojon ankaŭ en la internacian kulturmedion". Ni esperu, ke la eldonkvanto 10 000 sufiĉas. Havebla ĉe ĈEA por 5 Kčs, sed ankaŭ ĉe ĉiuj vendejoj de libroj el Sovetio.

/zh/

NOVA LIBRO DE M. ISAJEV-Kiel anoncis la bulteno "Novyje knigi SSSR"/1976, n-ro 49, poz.122/, en la kvara kvaronjaro de 1977 aperos en angla lingvo libro "Planado de naciaj lingvoj en Sovetunio". Ĝi kostos 2,45 rb.- La libro prezentas la rican sovetan sperton en solvado de lingvaj problemoj

en multnacia socialisma ŝtato. La aŭtoro pritraktas la bazajn etapojn de la lingva konstruado en Sovetunio, dum kiu estis kreitaj proksimume kvindek novaj literaturoj por antaŭe senliteraturaj lingvoj. Prezentigas la bazaj etapoj de evoluo de 130 lingvoj de Sovetunio. La ĉapitroj traktas la reciprokan influon de la lingvoj, estiĝon kaj funkciadon de la rusa lingvo kiel lingvo por komunikado inter la nacioj. La libro parolas pri kelkaj teoriaj problemoj de lingva planado, semmaskigan burĝajn sciencistojn kiuj falsas soveta sperton de la solvo de problemoj pri nacio kaj lingvo. La fina ĉapitro enhavas opiniojn de sovetaj sciencistoj - lingvistoj, historiistoj, filozofoj, sociologoj - pri la problemoj de lingva evoluo en estonteco. La libro estas mendabla ĉe "Mejdunarodnaja kniga"; oni indiku la mendonumeron: NK 49-76 -122.

/zh/



El Fervojojista sekcio

NOVA MEMBRO de IFEF -komitato kaj peranto de la gazeto Internacia Fervojojisto por la jaroj 1977-78 fariĝis František Struminsky kiel reprezentanto de la fervojojista sekcio de ĈEA. Lia adreso: U nemocnice -Ĉeská 5, CS 735 01 Havířov 1.

EN HISTORIA KOMISIONO de IFEF estas reprezentita nia fervojojista sekcio per ĝia eksprezidanto kaj fondinto Bohumil Král el Praha.

FERIA INTERŜANĜO-kun hungaraj esperantistoj-fervojojistoj ni pritraktas senpagan interŝanĝon de du personoj. La somera restado okazos en tendaroj Lančov kaj - Balaton.

ABONPAGO DE INTERNACIA FERVOJISTO-Membroj de la fervojojista sekcio estis atendigitaj per aparta letero je aligo por abono de Internacia Fervojojisto en la jaro 1977. Ĉar la sekcio disponas nur per limigita nombro de la gazet-ekzempleroj, estas necese aliĝi kiel eble plej frue.

Statistiko "La movado en presoj"

Lau la eltondaĵoj, kiujn la Asocio mendas ĉe Eltondajaj Servoj /Výstřiž - ková služba Pražské informační služby/ kaj kiujn ordigas membro de la metodo kaj propaganda komisiono d-ro J. Hříb en Brno, estis farita jena statistiko:

Gazetoj en Ĉeĥa Socialisma Respubliko

Centraj gazetoj / plejparte ĵurnaloj /	14	-	31 eltondaĵoj
Budohemia regiono	1	-	4
Okcidentbohemia regiono	1	-	4
Nordbohemia regiono	1	-	6
Orientbohemia regiono	2	-	7
Sudmoravia regiono	4	-	18
Nordmoravia regiono	3	-	10

Entute 26 - 80 eltondaĵoj

Gazetoj en Slovaka Socialisma Respubliko

Centraj gazetoj /plejparte ĵurnaloj/	12	-	46 eltondaĵoj
Centraslovakia regiono	1	-	5
Orientslovakia regiono	2	-	33

Entute 15 - 84 eltondaĵoj

Enkalkulitaj ne estis fabriakaj gazetoj kaj la plejparto de distriktaĵoj gazetoj, ĉar tiujn Eltondajaj Servoj ne liveras. Ni petas la lokaj grupojn, ke ili zorgu pri regula informado de la lokaj redakcioj pri sia agado, ne forgesante ankaŭ redakciojn de fabriakaj gazetoj. Eltondaĵojn el distriktaĵoj kaj fabriakaj gazetoj sendu al la Asocio kun la noto "por metodika kaj propaganda komisiono". Dankon!

* El eksterlando *

GRAVA SUBTERNO AL ESPERANTO -Mi opinias tute ne malreala klopodo, ke estu akceptota lingvo peranta inter la naciaj por plibonigi interkomunikadon, diras profesoro Mihály S im a i, la prezidanto de Monda Ligo de UNO-Asocioj en la intervjuo por la HUNGARA VIVO /1977/1/. La ligo havas la ĉelon akceli internacian kunlaboradon kaj lukti por senarmigo. Kolektiva membro de la landa UNO-Asocio estas ankaŭ Hungara Esperanto-Asocio.

La intervjuito konstatis i.a., ke lingvaj aferoj en UNO kaŭzas ofte disputojn, eĉ ofendiĝojn, malgraŭ la eminenta funkciajtaĵo interpresita - kaj tradukista servoj. Lau li la plej dantoj por la solvo de tiu ĉi problemoj povus traktigi ĝin pere de iu internacia organizaĵo, ekzemple UEA. La Ligo poste povus transdoni ties proponon al ĝenerala sekretario de UNO.

Parolante pri la ideo enkonduki unu komunan lingvon prof. Simai notis, ke necesas priatendi la realaĵojn de la mondo. Oni devus i.a. de-vice instrui Esperanton en ĉiuj lar-

nejoj, sekve formi taŭgan instruistaron, kio postulas grandajn elspezojn. La argumentoj de esperantistoj estas sendube pripensindaj kaj ili foje devos igi ŝtatojn kaj internaciajn forumojn, ke ili okupiĝu pri la problemoj.

*PRINTEMPE EN KOSZALIN -Pola Esperanto-Asocio Filio en Koszalin, kune kun kultura Komisiono de la Ĉefa Estraro de PEA, Urba Kulturcentro en Koszalin kaj Koŝalina Sociokultura Asocio **i n v i t a s** al internacia esperantista renkontiĝo LA III Ĉebalta Esperantista printempo en Mielno-Uniesacie "Jelcz", str. Esperanto 1 /inter la 20a kaj 26a de majo/

*LETTERO KUN SUBSKRIBOJ de 140 hungaraj deputitoj estis transdonita al prezidanto de la Parlamenta Kultura Komisiono. La deputitoj petas, ke estu kreita speciala subkomisiono, kiu prijugu, ĉu estas utile akcepti unu solan lingvon por internaciaj rilatoj kaj ĉu Esperanto taŭgas por tiu ĉi rolo.

✂ Rondeta vivo ✂

BOR U TACHOVA - Okcidentbohemiaj esperantistoj, turista sekcio, anoncintaj en Starto sian intencon plivigligi sian aktivecon en la jaro 1977, komencis ĝin realigi per 30 km marŝo tra ĉirkaŭaĵo de Přimda, malgrau pika neĝado kaj frosta vento. Guste ĉiuj frosta vetero igis knabojn kaj knabinojn el EK Praha kaj Plzen kaj pluajn el Jablonec, Strakonice kaj Bor al temporekordoj. Dum la vespera amika kunesto koloraj dispozitivaj pri Transilvanio kaj Jizera - Montaro de s-anoj Jiřa kaj Horák ĉiujn ĝuigis. La ekskurso partoprenis turistoj fakoj de Sokol el Bor kaj Tachov, kio estas bona komenco por estonta kunlaboro. /ms/

BRNO - La 15.3. antaŭ plenplena klubo salono parolis universitata prof. A. Lamprecht DrCs. kaj doktoro de filozofio M. Čejka /filo de Th. Čejka el Bystřice pod Host., nestoro de la movado en la ĉefaj landoj/ je temo Problemaro de la nostrarikaj lingvoj. La parolado de ambaŭ sciencistoj estis sekvata kun ekstrema intereso pro la enhavo kaj ankaŭ tial, ĉar esperantistoj krome iom inklinas al lingvistiko kaj filologio. /von/

ČESKÁ TŘEBOVÁ - Senpage vi ricevos belan, ilustritan broŝuron pri Česká Třebová kaj ĉirkaŭaĵo. Neĝesas nur aldoni 2 respondkuponojn aŭ egalvaloron en postmarkoj por afranko. Skribu al: Jiří Pištora, náměstí Míru 1746, 560 02 Česká Třebová. - En Č.T. okazis jam la 8-a esperantista balo. Enkondukis ĝin s-ano J. Pištora, partoprenis pli ol 350 gesamideanoj, por plusaj ducent ne estis jam loko. Partoprenis s-anoj el diversaj lokoj de nia lando, venis esperantistoj el GDR, GFR kaj Austrio. Pri la sukcesa balo raportis tri ĵurnaloj kaj okazis radio-disaŭdigo el Hradec Králové. /ck/

PLZEŇ - Tre agrablan vesperon preparis al pilzenanoj la 24-an de februaro la sekretario de MEM, s-ano D. Kočvara, per sia parolado pri la kongreso de MEM en Ruse, akompanata per lumbildoj. La prelego, eĉ se organizita en mallonga tempo, kunvenigis dudek membrojn de la loka grupo.

PRAGO - La klubo jarkunveno /22.3/ okazis de la jubileo de Granda Ok -

tobra Revolucio, de la int. lingvo Esperanto kaj 75 jariĝo de EKP aŭdis la prelegon de d-ro R. Horský pri la porpacaj taskoj de la esperantistoj. La klubo alvokas ĉiujn grupojn en ĈSR, ke ili ankaŭ disvastigu la noblajn ideojn de la internacia kunlaboro kaj amikeco, kiujn celas la lingvo de J. Zamenhof.

PŘEROV - Fine de januaro okazis jarkunveno de la klubo, en kiu estis prezentita supervido pri la farita laboro en la pasinta jaro. Ĉi tiu aktiveco konsistis el instruado de la lingvo /en tri kursoj/, partopreno en seminarioj, someraj tendar - kursoj kaj vigla korespondado. En la tagoj 3.-5.9. pasintjare okazis jarkunveno de Fervojista Sekcio de ĈEA, kiun partoprenis 60 delegitoj kaj kelkaj esterlandaj gastoj. La jarkunveno bone sukcesis. /jt/

PŘÍBRAM - Regula ĉiumerkreda kunvenado, ankaŭ dum someraj ferioj, apartenas al bona tradicio de la klubo. Pluraj membroj partoprenas preparadon de la programoj. Plej ŝatataj estas prelegoj kun lumbildoj de s-ano instr. Fišerová pri siaj vojaĝoj tra pluraj ekzotaj landoj. /kr/

ABONU SCIENCEAN MONDON !

Ĉefredaktoro de la Esperanto-versio prof. Peovski petas pri subteno de tiu ĉi granda atingiĝo per amasa abono. Abonu jarkolektojn 1976 kaj 1977 ĉe Ĉefa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 00 Praha 1.

V PEVNĚ JEDNOTĚ RŮS A LIQU ZA DALŠÍ ÚSPĚCHY PŘI SLEDOVÁNÍ
ROZVÍJNĚTE SOCIALISTICKÉ SPOLUČENOSTI



: Informace sekretariátu :

* JAK JE TO S POČTEM ČLENŮ SVAZU

Často dostáváme dotazy o počtu členstva našeho svazu a jeho růstu. Ročně přijímáme asi 500-600 osob a skoro stejný počet, pro nás leckdy z nejništěných důvodů, neobnoví členství. Dnes již máme vydanou legitimaci s číslem 4400, ale sotva polovina je platnými členy svazu. Vedení svazu rozhodlo poslat ještě toto číslo Starta všem lonským členům a upozornit je, že bychom s nimi nadále, ikdyž neradi, nemohli počítat jako s členy. I letos ještě očekáváme, že 500 členů obnoví členství. Pokud se tak stane, mohl by se rok 1977, rok významných esperantských výročí stát rokem kdy skončí stagnace v růstu členské základny. Velký počet členů dává nejen finanční stabilitu svazu, ale znamená i významný faktor při posuzování vlivu organizace. Mnohde je nezaplacení členství i vinou vedení našich místních skupin. V krajním případě je nutno se obrátit přímo na sekretariát o složenku. lze také použít poštovní poukázky a do rubriky příjemce uvést adresu svazu a bankovní spojení: SEČS Praha 2, č.účtu 02-4632-7. Na rubu složenky uveďte poznámku: členství 1977. Pro členy našich místních skupin je výše členského příspěvku známa: výdělečně činný člen s příjmem nad 1.000 Kčs - 60.-Kčs ročně, studenti, vojáci, důchodci a ostatní s příjmem pod 1.000 Kčs - 30.-Kčs ročně.

* DOPORUČUJEME vám zaplatit si doživotní členství. Ušetříte si další starosti a přispějete ke stabilizaci členské základny. Částka 600 Kčs je jen relativně vysoká. Můžeme ji od vás přijmout i ve dvou splátkách v tomto roce. Jakmile dostaneme poslední splátku, zašleme vám novou legitimaci doživotního členství a novou známku.

* MNOŽSTVÍ ČLENŮ, které vedeme jako individuální překročil únosnou mez. Značně tím narůstá administrativa a lidé jsou otrženi od života našich místních skupin. V čísle 3/77 Starta vydáme úplný přehled adres našich místních skupin a již dnes prosíme vedoucí těchto skupin i ty členy, kterých se to bude týkat, aby se připravili, že se na ně vedení svazu obrátí s prosbou o vzájemnou spolupráci. Víme, že leckdy není možné docházet do schůzek pravidelně. Přesto však bude třeba, hlavně při hromadných akcích svazu, abyste více spolupracovali a to i při inkasu členských příspěvků a ty nám h r o m a d n ě ukazovali včas se seznamy osob, které příspěvek poukazují. My pak budeme moci h r o m a d n ě zasílat známky navedení MS.

Věříme, že se najde i mnoho lidí, kteří budou mít schopnost a možnost pomoci v organizaci skupin a jednou i zasednout v ústředních orgánech svazu. Vždyt koncem roku zahájíme již přípravné práce na III. sjezd ČES, který bude svolán v roce 1979 !

* CHCETE-LI POSLAT příspěvky do Starta napište redaktorům jednotlivých rubrik přímou jejich adresy, které níže uvádíme:

Josef Cink, 56 161 Červená voda 137, okr.Ústí n/Orl./Výuka esperanta/
Zdeněk Hráel, 602 00 Brno, Botanická 28 / Metodika, propagace/
Dr.Jaromír Jermář, CSc., Jabloňová 43, 106 00 Praha 10 / Teorie a historie mezinárodního jazyka /
Ing.Vlastimil Kočvara, Na dolním poli 10, 746 00 Opava /Kulturní akce/
Jaroslav Klement, Kpt.Nálepký 7,360 04 Karlovy Vary /Grafická úprava /
Josef Vondroušek, Jana Uhra 25, 600 00 Brno /Místní skupiny + novinky/
Ing. Jan Werner, Kraftova 84, 616 00 Brno 16 /Sekce a komise/

Příspěvky však musí již zpracované a upravené jak po jazykové tak stylistické stránce předat redaktoři rubrik do sekretariátu v následujících termínech:

Starto č.	3	4	5	6
Termín předání:	20.5	1.8	20.9	14.11

Jedině za těchto podmínek můžeme splnit termíny pro předání předloh tiskárně dle smlouvy. Příspěvky posílejte ihned, jakmile vznikne důvod pro napsání, pokud možno v esperantu. Později došlé příspěvky zveřejňme v následujícím čísle, pokud budou ještě aktuální.

Svaz nabíží:

- La Mastro de Korboja** - román z produkce estonského nakladatelství Eesti Raamat a v překladu B.Kjarta bude i pro vás zajímavou četbou. Cena je pouhých 5.-Kčs + pošt.
- Výstava** - o esperantu byla umístěna na 6 panelech. Panely jsou velikostí 120 x 60 cm, materiál hobra. Grafická úprava J.Klement. Půjčovní 25 Kčs za 1 měsíc. Podmínka půjčení, že si zájemce zajistí dopravu.
- Esperanto a propagace** - je obsahem zajímavé práce J.Klementa. Vědci, kdo chtějí pomoci v propagaci esperanta názornou formou, by si tuto pomůcku měli objednat. Je vytištěna v češtině. Zašleme vám ji za 3 Kčs + pošt.
- Panoramo** - je název kulturního almanachu. Vhodný dárek pro vaše zahraniční zájemce. Dvě poslední čísla obdržíte se slevou za 10 Kčs včetně poštovného. Neváhejte s objednávkou, máme na skladě jenom menší množství.
- Dopisní papíry** - jsou ve dvou druzích. Jeden se státní vlajkou s esperantským textem, druhý s esperantskou hvězdou a s nápisem Esperanto -lingvo internacia. Zasiíláme minimální množství 10 ks /včetně obálky / od jednoho druhu za 5 Kčs + poštovné.
- Esperanto parolata** - je nápis na tříbarevné samolepce o rozměrech 3,5 x 10 cm. Jsou vhodné pro propagaci jazyka. Tisk na holandském papíru zajišťuje dlouhou stálost barev. Používáme je na poštovních schránkách, dveřích do bytu, ke zvonkům, na skla aut a do výloh prodejen.
- Drobné samolepky** - vydávané na aršicích mezi 24 -28 ks jsou čtyřbarevné a slouží k široké propagaci esperanta jak u nás tak v zahraničí. Zajišťují rovněž bezpečné uzavření zásilky vkusným způsobem. Český text : Esperanto vás spojí s celým světem je na obdelníkových samolepkách. Cena za arch je 6 Kčs. Kruhové samolepky s esp. textem: Per Esperanto por la mondopaco jsou po 5 Kčs za 1 arch.
- Koko krias jam** - druhé vydání románu z produkce Maďarského esperantského svazu. Zajistili jsme pro vás několik výtisků. Cena za výtisk 46 Kčs.

HLAVNÍ DELEGÁT UEA v ČSSR, člen předsednictva svazu s.L.Rýznar, Ant. Slavička 22, Svitavy byl pověřen předsednictvem svazu dohledem nad organizováním hromadného zájezdu našich členů, případně i členů ZE SSR na Světový esperantský sjezd, který bude v roce 1978 ve Varně. Svaz bude pravděpodobně zajišťovat cestu do BIR, hromadný převod kongresových poplatků a nezbytné informace. Ubytování a stravování si zájemci zajistí podle svého zájmu a finančních možností přímo u Bulharského svazu. Kongresy jsou vždy pořádány koncem července a začátkem srpna. Plánujte si již dnes svoji dovolenou na tuto dobu.

Korespondi deziras

Ioan Vajda, Dupa Inisto 44, 2200 Brasov, RUMANIO • Hans Henriksson, Pk. 796, 220 07 Lund, SVEDEIO • Eugeniusz Córny Dolne 13 57-411 Wambierzyce, POLAND • Cornelius Trimborn, rektoro de mezlernejo, D-4791 Elsen FRG /liaj gelernantoj pri div. temoj/ • Yiu samideano povas prizorgi por japana bohémisto la tri eldonojn de Reportáž psaná na oprátce de J. Fučík ? Temas pri la 8-a el 1949 /eld. Naše vojsko/, 23-a el 1956 /če SPP/ kaj 24-a el 1957 /če SNPL/. - Skribu al : Kei Kurisu, Nogusa Danti, 154-1004, Hino-si, Tokio-JAPANIO.

Anoncetoj

Tarifo: 15 Kčs por 25 vortoj /5irpk/. Pri la enhavo de anoncetoj respondas nur anoncantoj.

"alnovajn gazetojn /eĉ unuopajn - numerojn/ el eksterlando kaj Ĉeĥoslovakio /ankau klubajn bultenojn / serĉas Zd. Hršel, Botanická 28, 602 00 Brno, Ĉeĥoslovakio. Atentigo petata.

Starŝi esperantŝk ĉasopisy / i ĵednotlivá ĉisla /zahraniĉni a tuzenské /vĉetně klubovních zpravodajů/ hledá Zd. Hršel, Botanická 28, 602 00 Brno. Prosím i o upozornění.

Kdo si před dvěma roky půjčil Dreznovu knihu " Historio de la Mondo lingvo", aby knihu laskavě vrátil J. Laubemu, Alej PA 811, 413 Ol Roudnice n.L.

Který pražský esperantista pro- najme místnost /byt/ I-III-kategorie na 1-2 roky ? Odměna za zprostřed- kování jistá. Nabídky zasílejte na sekretariát svazu.

Geedzoj Hana kaj Mirek Novák, Vĉel- ná 19, 405 02 Děčín X. ĈSSR, 30j. interesigaŝ pri bildkartoj kaj vo- jaĝo.

La kompilanto de Aviada Terminaro ser- ĉas samfakulojn-aviadistojn por kon- sultoj kaj kunlaboro. Jan Pospíšil, Lipanská 265, 251 01 Říčany u Prahy.

HEROLDO DE ESPERANTO přijímá inzerty 18x v roce. Cena za zveřejnění - do 25 slov je 50 Kčs a nad 25 slov 100 Kčs. Platby a texty vašich oznámení zasílejte na adresu svazu. Zveřejně- ní zprostředkujeme.

Kroniko

RENITAN JUBILEON DE SIA 90-a naskiĝ- tago ĝisvivos la 2-an de junio 1977 samideanino Božena Metznerová, ko- nata eĉ pli sub ŝia fraŭlina nomo Božena Vlčková. Dum multaj jardekoj ŝi sinofere aktivig por Esperanto en Kladno kaj ankaŭ en la lastaj ja- roj en Norda Bohemio, en Teplice. La modesta, bonkora, jubileantino ak- tivas kromalie ankaŭ sur la kampo literatura, ŝi kunlaboris eĉ la kom- pilo de la Ĉeĥoslovaka Antologio sub redakto de Ota Ginz kaj Dro St. Ka- marýt kaj tradukis ankaŭ la libreton "Urbo sub Signo de Fajro" de nacia artistino Marie Majerová. La merit- plena samideanino nun jam en senfa- milia soleco vivas en la maljunulejo en Dubí apud Teplice. Ŝia adreso estas Božena Metznerová, Ustav sociální pé- ĉe, Ruská 37, 317 01 Dubí u Teplic v C. Bonvolu ŝi tie akcepti niajn plej varmajn bondezirojn de plua firma sa- no kaj bonafarto kaj niajn dankojn por la farita grava laboro por la In- ternacia Lingvo.

Jiří Kořínek

Ni gratulas...

... al Marie Karasová kaj Ladislav Fiala, kiuj geedziĝis 25. 3. 1977;

... al Věra Ĉerná kaj Václav Muchna, kiuj geedziĝis 2. 4. 1977.

NEPREHLÉDNĚTE, NEPREHLÉDNĚTE !!

Ve dnech 27.-29.5.1977 pripravuje- me s MS Poděbrady setkání a semi- nár pro začínající esperantisty/a- le i pro ostatní/ z písemných kur- zů. Neváhejte a přihlaste se ihned na adrese: Pavel Polnický, Polabec novostavba, Poděbrady. Nashledanou.

STARTO - tiskový orgán ĈES. Vychází 6x ročně. Řídí redakční rada ve slo- žení: odpovědný redaktor O.Kníchal; zástupce dr. J.Jermář; členové: Jos. Gink, Z.Hršel, J.Mařík, J.Vondrou- šek, ing. J.Werner, ing.V. Kočvara, Z.Křimský a J.Klement. Tiskne roz- množovna Podniku služeb Neratovice.

Perant pro USSR: Alexandr S.Melnikov, p.k. 393 344 007- Rostov - Don 7.

IZOLAČNÍ ZÁVODY

BRNO

N.P.

656 35 BRNO, Brandlova 4

tel. 22216-19
telex 062437

VÝROBNÍ PROGRAM PODNIKU

Stavební montážní činnost:

tlakové izolace
izolace podzemních
a inženýrských objektů
živičné krytiny
foliové krytiny
konstrukce střešních pláští
tepelné izolace
stavebních objektů
tepelné izolace
technologických zařízení
tepelné izolace
chladíren a mrazíren
ochrana konstrukcí
proti vysokým teplotám
akustické obklady
stěn a stropů
zvukové izolace
průmyslových zařízení
akustické vybavení interiérů

podlahové úpravy
izolace
proti chemickým vlivům
montované příčky
střešní a obvodové pláště
průmyslových budov
dlažby z litého asfaltu
v průmyslových objektech
povrchy komunikací
z litého asfaltu
konstrukce komunikací

Vedlejší průmyslové činnosti:

výroba asfaltových izolačních pásů
výroba asfaltových izolačních desek
výroba speciálních povrchů
teplných izolací
výroba prefabrikátů
pro tepelné izolace



STAVIVA

*národní podnik; krajský závod
Brno, tř. Obránců míru 4
dodává stavebniny podnikům
socialistického sektoru
i soukromým spotřebitelům.*

STAVIVA

*nacia entreprenoj; regiona neĝoĉejo
Brno, tr. v'ánců míru 4
liveras stromaterialojn
al la entreprenoj de socialisma sektoro
kaj ankaŭ al privataj konsumantoj.*

STAVIVA